

Kultura vivo en franglingva Svislando

Claude Gacond, 66-a radioprelego, 1964.03.04 & 07

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio pri la kultura vivo en franglingva Svislando. Vi aŭdas Claude Gacond.

Multaj turistoj miras, kiam dum tramigro en nia lando ili malkovras, ke ne ekzistas tutsvisa kulturo. Ili ja sciis, ke en Svislando estas parolataj kvar lingvoj, sed ili ne konsciis, ke tio signifas, ke en nia lando necese renkontiĝas, aŭ kelkfoje alfrontiĝas, tri grandaj kulturoj : la germana, la franca kaj la itala (laŭ ilia graveco por la svisa vivo). La kvara kulturo, tiu evoluanta ĉirkaŭ la lingvo romanĉa en la kantono Grizono, koncernas nur unu procenton de la svisa loĝantaro.

La esperantistoj, kiuj deziras studi la svisan penson, povas legi la *Svisan Antologion* redaktitan de d-ro Arthur Baur, kies voĉon vi ĉiusemajne aŭdas ĉe niaj esperantaj elsendoj. Ni devas konfesi, ke tiu verko ne nur estas utila al eksterlandanoj, kiuj deziras informiĝi pri la svisa literaturo, sed ke ĝi estas ankaŭ treege utila al ni mem, ĉar ni tre malbone konas la diversajn literaturojn de la kvar etnoj de nia lando. Ni eĉ tre malfacile konas nian propran literaturon, ĉar, kiel por la esperanta literaturo, ne ekzistas antologioj, kiuj ĝin sisteme trastudas.

Kiel franglingvano mi studis la francan literaturon. Sed kiel velŝo (franglingva sviso) mi tamen aprezas alian literaturon certe malpli gravan, sed por ni tamen tre valoran, la literaturon de velŝlando. Ĉar ne ekzistas multaj kritikistoj, kiuj havas tiun ŝaton, ni malfacile konatiĝas kun niaj verkistoj, pensistoj kaj poetoj. Tio estas la problemo de ĉiuj provincoj rilate la metropolon, por ni Parizo.

En 1889 aperis du literaturaj historioj de Velŝlando, tiu de Virgil Rossel kaj tiu de Philippe Godet. Ili estis konkurencaj kaj komplementaj. Mankis al ni inventaro pri la penso en nia landeto dum la fino de la pasinta jarcento kaj la komenco de nia jarcento. Tiu inventaro ĵus aperis sub la formo de preskaŭ milpaĝa verko kun multaj portretoj kaj citaĵoj. Tiu verko titolita *La Suisse romande au cap du 20^{eme} siècle, portrait littéraire et moral* estos gvidilo por ĉiuj, kiuj ŝatas sian landeton Velŝlando kaj ties pensistojn, verkistojn kaj poetojn. Ni ŝuldas tiun gravan monumentan libron al la ĝeneva profesoro Alfred Berchtold, kiu naskiĝis en 1925 en Parizo, kie li frekventis la elementan lernejon kaj la liceon. Ĉiujare li feriiis en Svislando, kaj ekde 1940 li vivis en Zürich kun sia patrino. Tie li finis siajn gimnaziajn studojn. En 1944, post la trapaso de la abituriento, Alfred Berchtold forlasis la svisgermanan urbon por Ĝenevo, en kies universitato li fariĝis la lernanto de profesoro Marcel Raymond.

Al André Jobin, intervjuisto de la semajna gazeto *Construire*, Alfred Berchtold diris, ke alveninte en Svislando lin frapis la de kantono al kantono nekono de la kultura vivo de la tuta lando. Li miris, ke oni povas instrui gepatran lingvon forlasante ĉion, kio profunde influis la animon de la lando. Pro tio Alfred Berchtold ekinteresiĝis pri la svisaj kulturaj demandoj. Li provis malkovri landon, kaj hodiaŭ, dank'al lia laboro ni povas malkovri nin mem.

Legante tiun prezenton de la penso en Velŝlando ĉe la komenco de nia jarcento ni malkovras, ke la protestantismo, kiu disvastiĝis el Ĝenevo, ankoraŭ profunde influas la penson de la filozofoj, verkistoj kaj edukistoj de nia lando kaj ne restis sen influo sur la vivon de multaj francaj pensistoj. La protestantoj de la kantonoj Ĝenevo, Vaŭdo kaj Neuŝatelo malkovras, malantaŭ la penso de Gaston Frommel, Philippe Bridel, René Guisan kaj multaj aliaj teologoj, siajn proprajn dubojn kaj esperojn. La katolikoj malkovras la valoron de la katolika ĉeesto en lando ĉefe protestanta.

Sed en tiu libro Alfred Berchtold ne nur ekzamenas la influon de la religio sur la penson. Li prezentas al ni niajn grandajn kaj etajn geniojn : verkistoj, poetoj, pedagogoj, psikologoj kaj filozofoj. Malofte libro tiom instigis min legi aliajn librojn. Ĉiu prezento de aŭtoro vekas en ni simpatian por la portretito kaj deziron pli intimiĝi kun lia verkaro.

Kultura vivo en franclingva Svislando

Claude Gacond, 66-a radioprelego, 1964.03.04 & 07

Eble inter vi, karaj aŭdantoj, troviĝas personoj, kiuj intencas ferii en franca Svislando dum venonta somero. Li aĉetu tiun belan libron de Alfred Berchtold, se li legas la francan, kaj meditu, dum trankvila legado, la riĉecon de la penso de Alexandre Vinet, de Ernest Naville, nia granda ĝeneva samideano, de Félix Bovet kaj de lia filo Pierre Bovet, bone konata de la esperantistaro, de Adolphe Ferrière, alia esperantisto, de Auguste Forel, bone konata de la bahaanoj, de Pierre Ceresole, la fondinto de Internacia Civila Helpservo kaj ankaŭ samideano, de Ferdinand Hodler, la patro de Hector Hodler, la fondinto de Universala Esperanto-Asocio.

Vi tiam rimarkos iujn ligojn, kiuj ekzistas inter la spirito reginta en Velŝlando en la komenco de nia jarcento kaj tiu de la tiama esperantistaro. Vi eble komprenos pli bone la penson de la juna Edmond Privat kaj la apogon, kiun li facile ricevis por aranĝi en Ĝenevo en 1906 la duan Universalan Kongreson. Vi ankaŭ komprenos, kial tiom da pensistoj de nia lando fariĝis mondlingvanoj. Ni jam citis multajn nomojn. Ni ankoraŭ menciis la filozofon Charles Baudoin, kies vivon ni rememorigis antaŭ kelkaj elsendoj.

La prezento de tiu grava verko certe vekis vian intereson. Dum tiu printempo ni elsendos serion de prelegoj pri la cititaj personoj. Ili helpas al vi pli bone koni nian landeton, kiu ludis en la franca kulturo kaj poste en la monda ege grandan rolon.

Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude Gacond parolis pri la kultura vivo en franclingva Svislando.

Ĝis reaŭdo !

-oOo-